



Esperanto en Danio

22-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2015



2015

ESPERANTO

Justa komunikado

ESPERANTO

*ESPERANTO
TAGO*

26.07.2015

Lernu Esperanton: www.lernu.net



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Filippo Botta

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

15.08.2015

Enhavo

Alvoko.....	3
Terurega Tertremo en mia vivo.	4
Jarraporto de DEA por la jaro 2014.....	8
Kalkulaĵo de DEA 2014.....	14
Entuziasmulo ne plu estas....	15
Granda naskiĝtago en Kolding	17
La Amika Rondo en Roskilde	17
Okazos en Kopenhago.....	19
Fariĝu socia entreprenisto....	20
Dek reguloj por Esperantistoj	22
Saluto de paco.....	23
Seulo gastigos la 102-an UK.	23
Esperanto en la familio.....	24
Esperanto en eŭropaj organoj	25
Esperanto en usona artomuzeo.....	27

Alvoko



La tertremo en Nepalo ŝokis nin ĉiujn kaj la situacio estas ege grava. La prezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio sendis alvokon pri monhelpo, al kiu ni ne povas silenti. Tial la estraro de DEA petas sian membraron sendi kontribuon laŭ sia povo al la bankkonto de DEA: reg.: 1551 konto 8057370 .kun la rimarko: helpo al

Nepalo. La monhelpo estos sendita al la nepala asocio pere de UEA. Ni kortuŝe kondolencas! – Jen la alvoko:

Kiel vi ĉiuj scias, nia lando estis frapita de la forta tertremo (7,9 laŭ la Richter-skalo) kiu kaŭzis mortigon de miloj da homoj kaj damaĝis ne imageblan posedaĵon. Postskuado daŭris kaj homoj devis dormi sub la ĉielo. Pro la pluvo, la vivo estis pli terua por tiuj kiuj eĉ eskapis la morton. Preskaŭ ĉiuj domoj estis damaĝitaj, sed multaj en Katmanduo estas bonŝance ankoraŭ loĝeblaj. Postskuado kaŭzis problemon por savi la viktimojn. La epicentro de la tertremo estis Barpa, ĉirkaŭ 80 kilometrojn norde de Katmanduo. La plej bela loko en la mondo. Riĉa je la kulturo, naturo kaj biodiverseco. Barpa estas nun tute detruita. Preskaŭ duono da la homoj mortis kaj ĉiuj domoj estis tute detruitaj. Simila situacio estas en multaj vilaĝoj en la regiono.

Dua plej malbone difektita distrikto estas Sindupalchok, alia montara distriko. Miloj da homoj mortis kaj milionoj iĝis senhejmuloj. Ili ne havas tendojn por dormi kaj nenion por manĝi. Trinkakvo estas grandega problemo. Lokoj kie amaso de homoj loĝas en unu loko, nun epidemio komenciĝas. Preskaŭ ĉiuj lernejoj ekster la valo estis detruitaj. Alia kortuŝa afero estis ke multaj atendis sub la ruino por la savado. Sed pro la manko de teknologio kaj sperta homarforto oni ne povis fosi ĝustatempe. Ili atendante savadon eble mortis. Ĝis hodiaŭ kelkaj vivantaj homoj estis savitaj de la enlandaj kaj eksterlandaj spertuloj. Oni suspektas ke miloj da homoj atendis/atendas savadon sub la detruitaj konstruaĵoj. La vivo de infanoj, maljunuloj kaj gravedaj virinoj estas tre mizeraj. La gravaj mondaj

heredaĵoj en Katmanduo estas tute detruitaj kaj ĝi saĝas kiel ruinoj de Monzedaro kaj Harapo. Ni elĉerpiĝis tiel ke ni neniam povas stariĝi.

Nepala Esperanto-Asocio, kiel landa asocio de UEA kaj ankaŭ samtempe parto de Nepala Registaro sentas respondecon kaj devon fari ion por la viktimoj en tiu ĉi terura momento en nia lando. Laŭ la ĝisnunaj informoj neniuj esperantistoj suferis je la severa vundo aŭ frontis morton en la katastrofo. Tio almenaŭ estas bona en Esperantujo. Sed tuta homaro ploras je la bedaŭrinda kaj terura katastrofo. Do, ni petas ĉiujn enlandajn kaj eksterlandajn esperantistojn helpi per monodonaco al nia UEA konto. La mono estos uzata laŭbezone al la viktimoj.

La nomoj de mondonacintoj aperos kun sumo kiun li aŭ ŝi donacis en nia revuo, "Montejo". Kaj informos kion ni faris/faros per la donacita sumo. Fine ni esprimas kortuŝan kondolencon al la familianoj de la mortintoj kaj fruan resanĝon de la vundintoj. Ni ankaŭ esprimas pacienon kaj kunlaboron inter Esperantistoj por trapasigi tiun naturan katastrofon kaj tempon.

*Bharat Kumar Ghimire
Ĝenerala Sekretario
Nepala Esperanto Asocio*

Terurega Tertremo en mia vivo.

Okazis tertremo en Nepalo, 2015/4/25. En tiu tago mi vekiĝis je la 7-a horo matene kaj iom legis pri ekonomio kaj financo ĉar mi estas studento de Komerco, poste manĝis matenmanĝon kun miaj familianoj. Kiel kutime, post la matenmanĝo mi decidis iri al oficejo de Nepala Esperanto-Asocio. Ĉar tiu tago estis sabato kaj preskaŭ ĉiusabate ni renkontiĝas en nia oficejo. Mi iomete piede iris de mia loĝejo por preni buson, sed hazarde survoje mi renkontiĝis kun miaj amikoj kaj iomete babilis, kaj iris al la busstacio. Buse mi veturis ĝis Sundhara (Sundhara estas bushaltejo proksime de la turo Dharara, tiu turo ankaŭ rompiĝis dum la tertremo kaj

mortigis pli ol 50 homojn). De tie mi ŝanĝis buso kaj iris ĝis Ratnapark.

Mi iomete haltiĝis en Ratnapark ĉar mi havis du eblajn vojojn atingi la E-oficejon. Mi elektis iom komplikan vojon kaj transiris la ponton de ĉefa strato laŭ tiu komplika vojo ekzistas multaj vendejoj. Mi decidis tiun vojon ĉar mi volis renkontiĝi kun mia amikino, kiu laboras en tiu kvartalo. Tiu kvartalo estas ege danĝera ĉar estas mallarĝa strato kaj ambaŭflanke estas vendejoj. Mi telefonis al ŝi kaj certigis, ĉu ŝi estas en vendejo aŭ ne, ŝi diris ke jes. Kaj mi daŭrigis mian iradon, pensante nian baldaŭan renkontiĝon. Mi alvenis ĉe la malnova domo, kie oni vendas ŝuojn.

Ĝuste en tiu momento komencis fali brikoj sur min, mi kuregis al la strato, sed pro la forteco de tertremo, mi ne povis bone kuri, tamen mi trafis la faladon de brikoj. Samtempe multaj aliaj homoj ankaŭ penis kuri kriante: Tertremo! Tertremo! Tertremo! La strato pleniĝis je homamaso. Kiam mi atingis la straton, mi faris longan spiradon kaj vidis malantaŭen ke la malnova domo preskaŭ detruigis. Mi vere eskapis la morton: Estas diraĵo “Por mortiĝi devas veni tago”. Do mi pensis, ke tiu tago ne estis tago de mia morto. Mi stariĝis ĉe la agitita strato kun multaj aliaj homoj kaj vidis homojn falantajn de sur motorcikloj, ili apenaŭ povis stariĝi kaj tertremo ĉesiĝis.

Homoj kuris al tiu malnova detruita domo por helpi viktimojn. Mi ankaŭ vere volis helpi viktimojn, sed mi nek povis moviĝi nek povis foriri. Subite, mi pensis pri mia koramikino kaj provis telefoni al ŝi, sed mi malsukcesis kaj sendis SMS al ŝi. Feliĉe ŝi estis sekura kaj poste, kontaktiĝis kun sekretario de Nepala Esperanto-Asocio Bharat Ghimire.

Mi vidis vunditojn sen kruroj, sen manoj, kun sango fluanta el la korpo, mi ne sukcesis helpi ilin. Mi de tie iris 10 minutojn piede al alia loko kie la turo de Katmanduo (Dharara) detruigis. Mi iomete helpis, sed mi pro mia malforta stato ne povis helpi. Mi pensis reveni al mia loĝejo, sed ne sukcesis trovi publikan buson. Do mi piede marŝis 30 minutojn ĝis Baneshwor kaj de tie mi prenis publikan buson kaj atingis loĝejon.

Jen mi listigas la ĉefajn punktojn pri la nepala tertremo

- Oni nomis la tertremon tertremo de Ghorkha. Barpak, kiu situas en Ghorkha distrikto, estis la epicentro de la tertremo kaj ĝi situas meze inter la fama urbo Pokhara kaj Katmanduo.
- Ĝi estas la dua plej forta tertremo en la historio de Nepalo kun la forteco de 7,9 laŭ la Richter-skalo. Antaŭa tertremo en la jaro 1993 havis fortecon de 8,5 kaj mortis pli ol 8000 homoj.
- Plej damaĝitaj distriktoj: Sindupalchok (pli ol 2500 mortintoj), Kathmandu (ĉirkaŭ 1300 mortintoj), Ghorkha (415 mortintoj), Bhaktapur, Lalitpur, Kavre, Nuwakot, Dholakha.
- La nombro de mortintoj jam superas 7000 kaj la vundintoj pli ol 15 000 inkluzive de 12 eŭropanoj (ĝis la 1-a de majo 2015).
- Pli ol 4500 lernejoj kaj 700 kuracejoj tute detruigis.
- Grupoj de savistoj nun helpas en izolitaj vilaĝoj kie pli ol 80% de la konstruaĵoj detruigis.
- La registaro taksas ke la nombro de mortintoj superos 10 000. Kaj anoncis kuraci senpage al viktimoj.
- Administri la eksterlandajn helpojn estas granda problemo por la registaro. La registaro ankoraŭ ne bone sukcesas distribui helpon al viktimoj.
- Grandega sumo de monhelpo venis el Japanio 800 milionoj da usonaj dolaroj. Ĉinio ankaŭ helpegas savi viktimojn kun moderaj ekipaĵoj, sed Barata registaro ĉefe zorgas pri siaj civitanoj, kiuj estas en Nepalo. Bhutana ĉefministro mem vizitis Nepalon kun monhelpo de miliono da usonaj dolaroj. Helpo ankaŭ venis el Britio, Kanado, Kataro, Pakistano, Srilanko, Aŭstralio, Koreio, Nederlando, Pollando, Germanio, Hispanio, Francio k.t.p.
- La vetero post la tertremo estas aĉa, foje pluvas, foje sunas.
- La loĝantoj en Katmanduo tranoktis ekster siaj domoj pro la timo de ripetitaj tertremoj (Pli ol 120 fojojn tertremis post la granda

tertrema ĝis 1-a de majo) de 29 - an de aprilo vivo en Katmanduo normaliga, sed timo ankoraŭ restas.

- Nun la loĝantoj de Katmanduo timas pri epidemio kaj forlasas Katmanduon. Jam miliono da popoloj forlasis Katmanduon.
- Mankas akvo, elektro kaj reto en diversaj kvartaloj de Katmanduo.
- Multegaj historiaĵoj detruigis: Patan Darbar, Hanuman Dhoka, Bharatpur Darbar placo, Dharara turo k.t.p. Tiuj estas ĉefaj allogaĵoj de turistoj. Inter ili kelkaj estas mondheredaĵo de UNESKO.
- Katmanduo ŝoviĝis 3 metrojn suden. Everesto restas en sama loko.
- Ĉiuj esperantistoj estas sekuraj.

Pradip Ghimire



Ĉu estas malfacile al vi memori la melodiojn de la danaj kantoj en Esperanto-traduko kiujn oni kantas dum klubaj vesperoj? Eble vi eĉ ne konas ilin? Nun Betty Chatterjee komencis kolekton de danaj kantoj kun YouTube-videoj, por ke estu pli facile lerni la kantojn. Ĉi tiun bildon ŝi elektis por “Vintra kanto” (I sne står urt og busk i skjul).

Jen la ligilo: <http://dankantoj.blogspot.dk/>

Jarraporto de DEA por la jaro 2014

Dum la jaro DEA partoprenis en diversaj aranĝoj.

En februaro kiel kutime ni partoprenis en la foiro Krop-Sind-And en Falkoner Centro, kie ni alparolis interesitojn. Por la dua fojo ni partoprenis en la popola renkontiĝo “Folkemode” en Bornholm. Peter Wraae reprezentis nin kaj alparolis multajn ĉeestantojn, kaj estis ankaŭ intervjuita de la dana radio. En Aŭgusto ni partoprenis en la foiro “Gustumu la Mondon” (Smag Verden) organizita de la Kopenhaga Komunumo. En Julio okazis la 10-a kongreso de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), kiun ĉeestis 7 membroj. Nia estrarano Bent Jensenius sukcesis akiri budon en “Foiro pri Kvalitaj Vojaĝoj” (Rejsemessen for Kvalitetsrejser) en oktobro. Li kolektis plurajn adresojn de interesitoj, sed kiam li poste kontaktis ilin aŭtune neniu el ili aliĝis al nia kurso por komencantoj.

Post 3 malakceptoj, DEA finfine sukcesis akiri subvencion de EU, nomita Erasmus+ projekto. La projekto estas pri instruista trejnado. La tasko estas sendi niajn E-instruistojn al aliaj eŭropaj E-organizoj por akiri pli da instruista trejnado. Du el niaj instruistoj jam ĉeestis trejnadon en Herzberg ĉi-printempe. Aliaj sekvos somere kiam ILEI dum sia konferenco en Julio organizas specialan programon pri instruista trejnado.

Kunlabore kun KEK, DEA aranĝis denove sukcesan Zamenhofan feston la 14-an de Decembro.

Bedaŭrinde ankaŭ en 2014 ni konstatis ke la nombro de niaj membroj malkreskas, precipe en Kopenhago, dum la nombro de la aliaj kluboj estas stabila. Por ke novaj membroj spertu internacian etoson dum la Universala Kongreso, ni kaptis la ideon aranĝi bus-karavanon al la venonta 100-jara jubilea kongreso en Lille, Francio, kaj ni povas konstati, ke multaj aliĝis, inter ili pluraj kiuj neniam ĉe-estis Universalan Kongreson.

Tamen ege bona novaĵo por la dana movado estas, ke la junulara sekcio DEJO revigliĝis kun nova prezidanto, Filippo Botta, kiu tre aktivis por akiri novajn membrojn, Espereble tio alportos al varbado de pluraj junuloj, kion ni ege bezonas en la movado, ĉar niaj tre stabilaj sed maljunaj membroj bedaŭrinde ofte malaperas de la movado pro aĝo kaj forpaso. Ne

ĉiuj mondopartoj spertas stagnon, ekzemple en Azio la membronombro plialtiĝis, kaj la nombro de individuaj membroj de UEA konsekvence ankaŭ plialtiĝis.

Fine mi dankas miajn estrarkolegojn pro ege bona kunlaboro dum la jaro, kaj niajn membrojn kiuj apogas nian laboron!

Eksteraj rilatoj

Ni estas daŭre membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio, membro de K.U.K.S., la ombrela asocio de danaj kaj alilandaj kulturaj asocioj, de ombrela organizo de Kleriga Ligo (Oplysningsforbund) kaj de la Ministerio de Paco (Fredsminderiet), ombrela organizo de asocioj de la pacmovado, ĉar nia intenco estas, ke ni estas videblaj al la ekstera mondo, kaj tion oni povas fari reprezentante DEA en tiuj organizoj, kiam ili kunvenas.

Informado

Esperanto en Danio

Nia revuo daŭre aperas 4 fojojn jare, sed ni devas serioze decidi pri reta elsendo por la membroj kiuj havas retaliron.

Fejsbuko

La fejsbukan paĝon “Amikoj de la Dana Esperanto-Asocio” prizorgas daŭre nia aktiva membro Betty Chatterjee.

Hejmpaĝo

Finfine la nova hejmpaĝo aperis, kaj ĝin prizorgas ankaŭ nia aktiva Betty Chatterjee.

Gazetartikoloj

(Raportas J.S.Larsen)

Laŭ la reta datumbazo “Infomedia” la vorto “Esperanto” aperis entute 49-foje en la dana gazetaro dum 2014. Plej ofte (20-foje) temis pri hazardaj mencioj kiel metaforo por “stranga lingvo” aŭ (iom pli ofte) “komuna lingvo”. Kvarfoje ĝi aperis en kvizoj k.s., interalie unufoje en klarigo kial oni danlingve nomas nekompreneblan lingvaĵon “volapyk”. Esperanto

ludis gravan rolon en la artekspozicio “Open Wire” en Koge, kaj el tio rezultis ok mencioj. En du recenzoj de la romano “Inter amikoj” de la Israela verkisto Amos Oz menciigâs, ke rolas en ĝi esperantisto. Kvin mencioj ŝuldiĝas al tio, ke altkvalita restoracio en Stokholmo nomiĝas “Esperanto”, tri al personaj memoroj pri esperantistoj, du al la ĉeesto de Esperanto en respektive Vikipedio kaj Google Translate, kaj unu al nekrologo pri Esperanto-parolinto (Helmer Grønberg).

La malgrandan nombron de mencioj iom kompensas la kvalito de kelkaj. La 22-an de januaro BT havis artikoleon pri Moresnet, kiu estis projektita Esperanto-ŝtato antaŭ la unua mondmilito. La 11-an de aprilo Weekend-avisen havis grandan artikolon pri ekspozicio en Varsovio pri la juda vivo antaŭ la dua mondmilito, kaj tie menciigâs Zamenhof kaj Esperanto en vasta kunteksto. La 12-an de aŭgusto la kroniko de Politiken estis verkita de Niels Erik Fischer, kiu tie prezentis sian vizion pri la estonteco, en kiu Esperanto ĝeneraliĝis. Sammonate en la revuo “Folkeskolen” Bjarne Stig Hansen en komento pledis por rezigni pri pliaj fremdlingvoj en la bazlernejo favore al Esperanto, “la vojo antaŭen”.

Libroservo

(Raportas Arne Casper)

La tendenco estas klara ke la Libroservo ne vendas tiom da libroj kiel antaŭe, same kiel la Libroservo de UEA kiu ankaŭ plendas pri malplibona vendado. Tio estas bedaŭrinde ĉar oni multe lernas legante librojn. Ĝojiga afero estis tamen la eldonoj de Dana-Esperanto Vortaro kaj de la mem-biografio de Carl Nielsen “Mia Fuena Infanaĝo”.

Ĉefdelegita laboro

(Raportas Arne Casper)

La nombro de individuaj membroj de UEA estas stabila, same la nombro de membroj de Societo Zamenhof.

DEJO

Revigliĝis kaj havis sian jarkunveno antaŭ monato. Espereble estos pli da informoj venontfoje.

Jarraportoj de la kluboj

KEK – Kopenhago

(Raportas Peter Wraae)

Unu jaro pasis ekde la lasta jarkunveno de KEK, do, oni povas konstati ke tempo pasas rapide.

Ni, kiuj ŝatas Esperanton, volas ankaŭ rakonti al aliuloj pri nia lingvo, kaj dum la jaro ni havis kelkajn eblojn.

La 1-an de majo ni helpis Bent Jensenius, kiu organizis budon en Fælledparken, tie ni alparolis multajn partoprenantoj kiujn festis la Internacian Laboristan Tagon. La plej interesaj diskutoj okazis komence de la tago. Dum la fino de la posttagmezo estis kelkaj, kiuj estis tro ebriaj. Ni ankaŭ aŭdis la ĉefministron paroli, kaj havis agrablan tagon en la tre bona vetero. Laŭ mi bona ideo.

Dum la 13-a kaj 14-a de Junio mi havis la bonŝancon partopreni en la popolkunveno “Folkemødet” en Bornholm. Ni kunlaboris kun la pacmovado, kaj tio bone funkciis. Estis multe da homoj, kiuj vizitis la lokon, kaj havis intereson aŭdi kaj ankaŭ diskuti pri nia lingvo. Mi restis 2 plenajn tagojn kaj revenis hejmen kun bona impresio.

Ĉi-somere mi vojaĝis al Svedio por havi impreson pri la sveda movado, kaj mi vizitis en Julio Lesjöfors Vandrehjem dum unu semajno. Estas iomete malfacile alveni al tiu loko kiu estas tiel longe for en norda direkto, ĉar se ĝi estis pli sude, verŝajne multe pli da homoj ŝatus viziti tiun lokon. Mi ĝuis la restadon, kaj salutis multajn svedajn kaj norvegajn esperantistojn.

La 23-a de Aŭgusto ni partoprenis, kiel kutime, en “Gustumu la mondon” aŭ “Smag verden”. Pluraj helpantoj de la klubo bone zorgis pri nian budo, kaj ni parolis kun kelkaj personoj, kiuj interesiĝis pri nia lingvo.

Pri nia klubo ni bedaŭrinde povas konstati ke la nombro de la membroj malkreskas, tiel en la plejparto de la kluboj en la mondo. Dum alvokoj al nepagitaj membroj mi malkovris ke la plej maljunaj membroj, kiuj forlasis nian klubon, fakte ofte pagis la kotizon dum multaj jaroj por apogi nin, eĉ

se ili neniam vizitis la klubon.

Mi kvar fojojn jare faras la programon por KEK, kaj se estas iu, kiu havas bonajn ideojn pri kio fari, ne hezitu kontakti min. Mi elkore volas danki ĉiujn, kiuj faras prelegojn en nia klubo, estas grave, ke ekzistas agemaj kaj helpemaj homoj, kiuj havas la forton kaj la kuraĝon distri pri io.

Amir Hadžiahmetović parolis pri “Fakoj kaj mitoj pri Islamo”, Wolfgang Kirchstein rakontis pri lia sperto lerni “La rusan per Esperanto”, Filipino Botta rakontis pri “Hungara renkontiĝo”. Ana Røssum faris kelkajn interesajn kvizojn. Betty Chatterjee gvidis la legadon de la libro “Mia Fuena Infanaĝo” de Carl Nielsen. Bent Jensenius gvidis la legadon de Esperantaj noveloj, kiu ofte kreas viglajn diskutojn. Zita Blaust gvidis interesan vesperon kun posta diskuto. Ann-Louise Åkerlund el Svedio ankaŭ vizitis nin kaj rakontis pri unu el siaj vojaĝoj.

Århus Esperanto-Klubo

(Raportas Stanisław Mielczarek)

Denove pasis unu jaro de nia aktivado en la klubo. Ĝi havas nun 26 membrojn.

La nova kunvenejo en Folkestedet montriĝis bona. Ankaŭ la kunventagoj – vendredoj, anstataŭ ĵaŭdoj, estas pli konvenaj por ĉiuj. Ni povas esti kontentaj pri la partoprenado en la kunvenoj.

La temoj de la kunvenoj estis diversaj, interalie Henryka kaj Stanisław Mielczarek daŭrigis la pasintjaran vojaĝon al belega Kroatio. Ni aŭdis kaj rigardis fotojn pri tre malnova urbo – Zadar, kiu situas ĉe Mediteraneo, kaj kien alflugas Ryanair-aviadilo Billund-Zadar. Nia veterano – Henry Simonsen rakontis pri sia vivo. La Somera ekskurso 2014 estis ekskurso al la muzeoj en Skanderborg kaj ĉirkaŭaĵo. Ni vizitis Øm Kloster, Skanderborg Bunker kaj Skanderborg Museum. En oktobro Grethe Kvist kaj Erik Hjorth per rakontado kaj fotografajoj gvidis nin al bela Barcelono, Hispanio. En majo Stanisław Mielczarek malsanis je kancero, estis operaciita kaj en novembro faris prelegon “Mia ‘renkontiĝo’ kun kancero”. En decembro, laŭ la tradicio, ni solenis Zamenhof-tagon kaj Kristnaskon. Stanisław Mielczarek okaze de la 100-jara datreveno de la 1-a Universala

Kongreso de Esperanto komencis vicon de prelegetoj pri Zamenhof, lia partopreno en la 1-a UK en Boulogne-sur-Mer ktp.

Henry Simonsen tradicie amuzis nin per Kristnaska historieto. Ni ĝuis varman vinon kun bulkoj, kafon/teon kun kuketoj, kiujn, kiel ĉiu-jare, prizorgis Agnete, Jørgen Kristoffersen kaj Henryka Mielczarek.

Dankon al vi ĉiuj por bona kunlaboro en la 2014-a jaro kaj ni esperu, ke la kuranta jaro ankaŭ estos bona!

Raporto de Nord-Jutlanda Esperanto-Klubo

(Raportas Ejnar Hjorth)

En 2014 ni estis 21 membroj, do estas same kiel la pasinta jaro, sed ĵus antaŭ nelonge du novaj membroj aliĝis.

Post la ekspozicio en Aalborghallen, mi ricevis 14 retroŝtajn adresojn de homoj, kiuj esprimis intereson pri Esperanto. Mi skribis al ĉiuj kaj invitis ilin al kurso. Sed mi notis, ke estos en septembro, ke ni havas novan kurson. Tiam mi denove skribos al ĉiuj.

Mi ripetas, ke la plej grava afero por ni estas informi pri Esperanto kaj oferti instruadon. Se ni ne faras tion, la kluboj mortos.

Mi notis, ke la sama firmao, kiu aranĝas ekspozicion en Aalborg, nun ankaŭ faros tion en Odense en 2015. Mi proponas, ke DEA havu budon tie.

Nia klubaktiveco estas preskaŭ nur kursoj kaj ekspozicioj. Ni havas kursojn je 3 niveloj.

La 31-an de decembro 2014 ni havis 10 580 kr en la banko. Ni gajnis ekstran monon pere de tombolo. Nia jara kotizo estis same kiel en la antaŭa jaro.

La membroj de la estraro estis:

Prezidanto: Ejnar Hjorth

Membro: Annette Holck

Kasisto: Karen Jorgensen

Revizisto: Karen Busck

Sekretario: Else Hjorth


Kalkulažo de DEA 2014

DEAs regnskab 2014


<i>Indtægter</i>	<i>Kr.</i>	<i>Udgifter</i>	<i>Kr.</i>
Kontingent klubber	11.890	Administration	16.274
Individuaj	11.865	Gebyrer	300
DEJO	475	UEA & EEU konting.	1.740
Øvrige indt.	675	Uddannelseskonto	2.937
Libroservo	6.259	Arrangementer	11.602
Renter	6.067	EeD	5.536
I alt indtægter	37.231	Udgifter	38.389
Årets resultat	./. 1.158		

<i>Aktiver</i>	<i>Kr.</i>	<i>Passiver</i>	<i>Kr.</i>
Obligationer	85.986	Egenkapital primo	157.368
Libroservo	52.534	Årets resultat	./. <u>1.158</u>
UEA konto	651	Egenkapital ultimo	156.210
Bankindestående DEA	25.739	Forudb.kontingent	5.700
Obligationer Noll	57936	Noll kapital ult.	57.936
		Kreditorer	3.000
	222.846		222.846

Ileana Schrøder
Formand



Arne Casper
Kasserer



Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den

23/3-2015

Tara Gregers

Tara Gregers
Revisor

Sven Sandø

Sven Sandø
Revisor

Entuziasmulo ne plu estas

Memorigaj vortoj okaze de la forpaso de Eugeniusz Rybarczyk

La 3-an de aprilo 2015, post kelktempa malsano, nia kara amiko Eugeniusz Rybarczyk forpasis.



La rekviema meso – en la pola lingvo – okazis la 10-an de aprilo en la katolika preĝejo “**Sankt Annæ**“, Kopenhago.

Post la meso la akompanantaro, konsistanta el familianoj, geamikoj – poloj, danoj kaj esperantistoj – akompanis Eugeniusz al lia lasta ripozejo en la tombejo de Sundby.

La Esperanto-movado perdis fidelan kaj entuziasman kunlaboranton, kiu agadis multflanke, nacie kaj internacie. Oni rimarkis, ke li havas profundan amon por nia lingvo, uzante multe da tempo por servi kaj ĝui Esperantujon.

Eugeniusz estis tre sincera kaj societema persono kaj akiris multajn geamikojn kiuj aprezis liajn personajn kvalitojn.

Mi renkontis Eugeniusz unuafoje en Kopenhago en 2001 okaze de kunveno en la katolika historia unuiĝo “**Ælnoth**”.

Ekvidante lian verdstelan insignon mi turnis min al li. Post interesa kaj fruktodona interparolado pri interalie Esperanto li instigis min reveni al la Esperanto-movado, ĉar tiutempe mi ne estis aktiva esperantisto. Naŭ jaroj pasis antaŭ ol mi kaptis tiun instigon revenante al la Esperanto-movado en 2010. Por ĉiam mi restos dankema al Eugeniusz pro tiu unua renkontiĝo.

Eugeniusz estis tre aktiva en la Esperanto-movado. Membro de la kopenhaga klubo **Konversacia Esperanto-Klubo** (KEK), kie li fidele partoprenis la klubajn aranĝojn. De tempo al tempo li gvidis klub-vesperojn, faris prelegojn same kiel li ankaŭ estis gvidanto de urbaj rondiroj kaj ekskursoj en la regiono de Kopenhago.

Li estis unu el la kontaktuloj de la **Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo** (KEKG), kiu aranĝis prelegvesperojn en la **Civitana Domo de Frederiksberg**. En 2004 li prelegis pri la temo “Mallonga historio pri la baltaj landoj kaj Baltaj Esperanto-Tagoj”.

Plurfoje Eugeniusz raportis por **ESPERANTO EN DANIO** pri siaj impresoj de kongresoj kaj aliaj eventoj en baltaj landoj.

Li ankaŭ partoprenis eventojn en la pola ambasado en Hellerup. Unu el ili estis la **Zamenhof-festo en 2004**, omaĝe al L.L. Zamenhof kaj memore al la Unesko-Resolucio favore al Esperanto. Parto de la programo okazis dulingve. Eugeniusz prizorgis la interpretadon inter Esperanto kaj la pola kune kun alia poldevena esperantisto, Stanisaw Mielczarek.

Per nelacigebla energio Eugeniusz fervore laboris por disvastigi la konon pri Esperanto. Ekzemple li aĉetis kaj sendis librojn, revuojn kaj aliajn esperantaĵojn al diversaj personoj, interalie al mi! Tio vere montris lian oferecon kaj malavarecon.

Esperanto estis granda parto de lia vivo same kiel la katolika eklezio estis. Kun engaĝiĝo li kombinis ambaŭ el ili, interalie per sia membreco de **Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista** (IKUE), kie li estis aktiva membro – kaj delegito por Danio. Li ankaŭ tradukis informilojn pri kopenhagaj preĝejoj, protestantaj/katolikaj, interalie la katolika katedralo “**Sankt Ansgar**”. Ankaŭ dana informilo pri Esperanto kaj la kristana eklezio estas verko de lia mano.

Mi deziras por lia filino, Anna, kaj ŝia edzo, ke ili, per la helpo de Dio, ekhavu la fortecon trairi sian funebbron.

Kara Eugeniusz, mi dankas Dion por vi, por ĉiuj bonaj momentoj kaj travivaĵoj en nia movado kaj en la katolika eklezio.

Vi eterne restos profunde en mia koro kaj en mia memoro.

Ripozu en paco!

“Mi ne mortos, mi eniros la vivon” (Sankta Teresa de la Kristinfano)

Clara Jensen

Granda naskiĝtago en Kolding



La 21-an de februaro nia Esperanto-instruistino Tove Bak havis sian 80-jaran naskiĝtagon.

Tove havis tiutage vizitojn de familianoj kaj amikoj. Ankaŭ ŝia favorataj studentoj venis por la okazo.

Tove nun dum kvar jaroj, unufoje semajne, instruas nin pri Esperanto. Ŝi estas tre entuziasma por paroli al ni pri la verdstela komunumo. Ĉi-jare, ni ĉiuj kvar de la grupo veturos al la Universala Kongreso en Lille, kiun ni plezure antaŭvidas.

Dankon por plaĉaj horoj kun vi. Viaj lernantoj Vinnie, Else kaj Kent.

La Amika Rondo en Roskilde

Ni estas kvar virinoj, kiuj regule renkontiĝas en Roskilde. La loko estas en tre malnovaj konstruaĵoj, kiuj antaŭe estis lernejo por porkobuĉistoj. Ni povas esti en malgranda ĉambro du horojn monate de la 14-a horo ĝis la 16-a. Ni jam du jarojn tiel renkontiĝas.

En la jaro 2006 Arne Casper venis el Kopenhago al Roskilde ĉiun trian sabaton dum du horoj. Ni estis 12 komencantoj, kiuj volis lerni Esperanton. Sed post kelkaj monatoj bedaŭrinde restis nur 6 personoj, kaj post Kristnasko ni estis nur 4 lernantoj.

Mi trovis la lingvon tre interesa, kaj mi ofte legis la tutan lernolibron ĝis la fino. Post Kristnasko unu el la virinoj diris, ke ŝi havas novan laboron kaj ne havas la tempon por studi la lingvon. La alia virino neniam preparis la hejmtaskon kaj bedaŭrinde juna viro subite mortis. Tiam la grupo ne plu ekzistis.

Feliĉe ekzistas la kopenhaga klubo, sed mi trovis, ke la vojaĝo tien kaj reen en la vespero estas tro longa por mi. Jaroj pasis, sed mi daŭre skribis Esperantojn leterojn al amikoj en kvin diversaj landoj.

Dum du jaroj mi partoprenis kunvenojn en la grupo de Næstved. Tie ĉio bone funkciis, kaj mi plu lernis la lingvon. Bedaŭrinde Henning Olsen, la gvidanto, mortis, kaj ankaŭ tiu grupo disirigis.

Antaŭ du jaroj mi eksciis, ke Roskildanoj, kiuj volas provi novajn farindaĵojn, rajtas kunveni en kulturdomo, kiu situas en forlasitaj konstruaĵoj en la urbo. La kulturdomo nomiĝas INSP, kiu venas de la vorto Inspiration. Ĉiuj kreemaj homoj povas veni kaj ĝui siajn interesojn. La komunumo iomete financas la projekton. Tie venas multaj diversaj personoj. Ekzemple junaj rifuĝintaj virinoj venas en la kafejon por lerni kuiradon. Viroj povas lerni ĉarpetadon. Pasintsomere ili faris per lignaj paleoj seĝojn kaj tablojn por Roskilde-Festivalo. Ili farbis la meblojn oranĝkoloraj, ĉar tiu estas la insigna koloro de la festivalo.

En la jaro 2013 mi demandis al INSP, ĉu malgranda Esperanto-grupo povos prunti ĉambron. Jes, bonvolu! Komence ni estis 6–8 virinoj, kiuj kune ĝuis bonan kunestadon. Sed la vivo ŝanĝiĝas, kaj kelkaj rezignis kaj kelkaj mortis. Dum la lasta jaro ni estas kvar virinoj, kiuj ĝuas la kunvenojn. Ni rakontas pri niaj novaĵoj, ni legas librojn, kaj por ĉiu kunveno ni verkas tekston pri memelektita temo. Ofte ni prezentas unu al aliaj amuzajn taskojn. *Kaj* dum du horoj ni rajtas paroli nur Esperanton. Do ni efektive provas ne krokodili.

Vibeke Lønberg

Okazos en Kopenhago

Ni kunvenas en la “Kulturdomo” Tomsgårdsvej 35, lunde je la 12.00 aŭ la 19.00 horo. Bonvolu noti ke la kutima enirejo estas barita pro riparlaboroj. Necesas eniri per la malantaŭa enirejo, ĉe la parkumejo.

Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk.

4/5 je la 12.00 en nia oficejo en la supra etaĝo.

Peter Wraae parolos pri sia lasta vojaĝo al Nepalo.

11/5 je la 19.00 en ĉambro B.

Babila vespero. Bonvolu veni kaj partopreni en agrabla vespero.

18/5 je la 19.00 en ĉambro B.

Betty Chatterjee gvidos. Ni legos la trian ĉapitron (paĝoj 60-76) de Mia Fuena Infanaĝo de Carl Nielsen. Se vi ne jam posedas la libron, ĝi estas aĉetebla por 100 kronoj.

25/5 Ne estos programo pr la pentekosto.

1/6 je la 12.00 nia oficejo en la supra etaĝo.

Betty Chatterjee gvidos. Ni legos la kvaran ĉapitron (paĝoj 77-88) de Mia Fuena Infanaĝo de Carl Nielsen. Se vi ne jam posedas la libron, ĝi estas aĉetebla por 100 kronoj.

8/6 je la 19.00 en ĉambro B.

Bent Jensenius gvidos: Plurpersonaj prelegetoj. Diversaj personoj prezentas diversajn temojn dum 10-20 minutoj.

15/6 je la 19.00 en ĉambro B.

Babila vespero. Bonvolu veni kaj partopreni en agrabla vespero.

22/6 je la 19.00 en ĉambro B.

Ana Røssum kaj Mette Hjerting parolos pri siaj vojaĝspertoj en Turkio.

Fariĝu socia entreprenisto

Esperantistoj plej ofte estas bonkoruloj, kiuj senhezite apogas bonfaradajn agadojn. Multe el ni estas samtempe konviktaj, ke Esperanto signifas amon, pacon, kunsentadon kaj aliajn bonajn ecojn. Ni povas apogi fondusojn de UEA: Ekzemple la fonduso Espero, kiu subtenas samideanojn, kiuj spertas malfacilaĵojn pro politikaj krizoj aŭ naturkatostrofoj. Alia ebleco estas fariĝi pruntanto en mikro-kredita organizo.

Mikrokreditoj ne estas donacoj. Oni komune pruntas al entreprenistoj sumetojn, kaj oni postulas al tiuj iom-post-ioman repagon. Muhammad Junus, la socia entreprenisto de Bangladeŝo, gajnis la Nobelpremion pri paco en la jaro 2006 pro sia sukceso evoluigi mikrokreditojn en Bangladeŝo. Aro da sociaj entreprenistoj kaptis la ideon kaj ili fondis la asocion Kiva en la jaro 2005.

Kiva estas senprofita organizo virtuala, kiu estis fondita en la jaro 2005. La celo de la organizo estas doni mikrokreditojn al tiuj, al kiuj mankas rimedojn por komenci malgrandajn komercojn. La organizo kunligas pruntedonantojn kun prunteprenantoj. Per tiel malmulte kiel \$25 (172 kronoj) oni povas apogi prunteprenanton.

Ekde la jaro 2005 jam estas:

- 1 282 915 prunteprenantoj
- \$695 898 650 pruntoj
- 98,72% de la pruntoj estas repagitaj.

Kiva kunlaboras kune kun 297 kunlaborantaj partneroj; 450 volontuloj en diversaj mondpartoj, en 86 landoj.

Kial ili tion faras?

Ĉar ili antaŭvidas mondon, kie ĉiuj, eĉ en la plej foraj regionoj de la mondo, havu la povon krei siajn proprajn ŝancojn. Ili opinias, ke la provizo de sekura kapitalo helpas homojn plibonigi la vivkondiĉojn kaj por si, kaj por siaj familianoj.

Kiel ili agadas?

Kiva kunlaboras kune kun mikro-kreditaj institucioj en kvin mondopartoj por provizi pruntojn al homoj sen aliro al tradiciaj bankoj. Ili sendas 100% de la pruntoj al mikro-kreditaj institucioj, kies nomo estas regionaj partneroj. Ilia respondeco estas la loka administrado de la pruntoj.

Kiva fidas al tutmonda reto de pli ol 450 volontuloj, kiuj kunlaboras kune kun niaj regionaj partneroj. Ilia tasko estas la redaktado kaj tradukado de la informoj de la prunteprenantoj ktp.

Kiel la administrado de Kiva estas financata?

Pruntedonantoj elekte donas iom pli kontraŭ la elspezoj administraj, tamen ĉefe Kiva ricevas la monon por tio de diversaj sponsoroj kaj fondusoj.

(traduko de Betty Chatterjee)

En Kiva troviĝas 37 338 teamoj. Ĉiu grupo havas propran maroton: kristanoj, biciklantoj ktp., kaj la asocio instigas al ili, ke ili konkurencu pri la pruntado. Tial krom la virto helpi al aliaj, per la agado oni povos promocii la reputacion de sia grupintereso. Oni trafus du celojn per unu ŝtono. Portempe la du plej sukcesaj grupoj estas grupo ateisma kaj grupo kristana.

Troviĝas ankaŭ Esperanto-teamo ĉe Kiva. Lars Knudsen de Ålborg fondis ĝin en la jaro 2008. Ekde tiam la grupo iom post iom grandiĝas, kaj ni nun estas 46 membroj, sed bedaŭrinde la Esperanto-grupo ne estas videbla inter la plej agadaj kaj sukcesaj teamoj.

Ni bonvenigos ĉiujn, kiuj helpante per relative modesta pruntado volas trafi du celojn per unu ŝtono: ke ni kiel esperantistoj aktive agadu por helpi aliajn; kaj ju pli da membroj des pli da videbleco de la vorto Esperanto en la portalo.

Jen la grupa invitilo.

<http://www.kiva.org/invitedto/esperanto/by/betty4078>

Betty Chatterjee

Dek reguloj por Esperantistoj

(Cititaj de kalendaro, eldonita de la gazeto “Esperanto”)

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto kaj lasu la versfaradon al la poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu; vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.
4. Propagandu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵo ne faru regulon, kaj el regulo ne faru malgravaĵon.
6. Verkante en Esperanto, ne kredis interesa kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron; ne malesperu, se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo aliĝu; la kunvenon vizitu; Esperante parolu.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa; senlace varbu por UEA.
9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti; kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu, kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.

(elĉerpitaĵo de Esperanto Raporto de Centra Dana Esperantista Ligo, 3. jarkolekto. Januaro 1916. N-ro 2.)

Betty Chatterjee

Saluto de paco

La Esperanto-Klubo de Stokholmo petis nin aperigi jenan “saluton al ĉiuj esperantistaj organizoj”:

Vide al la kreskantaj politikaj kaj ekonomiaj konfliktoj en la mondo, ni ripetas la firman konvinkon ke nia unua tasko kiel esperantistoj estas mem praktiki kaj apogi la fortojn de ne-perforto kaj dialogo ĉie ajn en la planedo. Neniu solvo de sociaj ekonomiaj konfliktoj troveblas en perforto, minacado kaj neniigo de vivoj de simplaj homoj.

Ni postulas de la politikistoj de la registaroj la ĉesigon de primitiva agresa agado en interpopolaj rilatoj.

Stockholm 2015-02-25

Membroj de Esperantoklubo de Stokholmo

Seulo gastigos la 102-an UK

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj prezentis tre bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la plej grava Esperanto-evento de la jaro. Pri tio raportis jam pli frue la Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer kaj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães, kiuj pasintjare faris esplorviziton al ambaŭ lokoj.

La Universala Kongreso okazos en Seulo por la dua fojo. En 1994 ĝi gastigis la 79-an UK kun 1776 aliĝintoj. Korea Esperanto-Asocio estas unu el la plej viglaj landaj asocioj de UEA. Pri tio elstare atestas ankaŭ la fakto, ke la nombro de individuaj membroj en Korea Respubliko pli ol duobliĝis pasintjare; el 52 al 112.

[GK UEA 575]

Esperanto en la familio



Personaj konatiĝoj, renkontiĝoj pere de Esperanto ofte rezultas geedziĝon. Ĉe tiuj internaciaj geedziĝoj – sekvante la vojon de la plej facila solvo – dum iu tempo hejme oni uzas Esperanton, kaj ankaŭ la naskiĝontaj infanoj aŭtomate ellernas ĝin. Por ili Esperanto estas iuspeca “familia komunika lingvo” –

apud la aliaj uzataj lingvoj. Tiuj infanoj kompreneble parolas la lingvon de sia loĝlando, kaj ili ofte ellernas ankaŭ la lingvojn de la gepatroj.

La nocio kaj nivelo de “familia lingvo” ne estas la sama kiel “lingvoscio kun gepatra nivelo” (= tre alta nivelo), ja la familia lingvo rilatas kutime nur al la persona kontaktado kaj informinterŝanĝo, tamen ĝi estas simile grava por la anoj de tiu komunumo, ja ĝi apartenas al ilia propra personeco.

La familioj uzantaj hejme Esperanton organizas eĉ ĉiujaran kunvenon, komunan feriadon. La ĉi-jara aranĝo “Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, REF” okazos en la centro de Eŭropo, en Hungario, inter 15-26-a de julio, apud la urbo Esztergom.

Interesa, nova videoregistraĵo ĉe Youtube montras intervjuon kun ses junuloj, uzantaj Esperanton en familia medio ekde sian naskiĝo. La filmeto havas subtekstan tradukon en 27 lingvoj.

Kiam oni rakontas pri Esperanto al eksterulo, indas doni retejan adreson kun nacilingva enhavo por eventualaj pliaj informoj.

Postskribo: La mesaĝo estas verkita lige al la internacia tago de la gepatra lingvo la 21-an de februaro...

László Szilvási

Esperanto en eŭropaj organoj



En novembro 2014 ekfunkciis la nova Eŭropa Komisiono – plenumorgano de la Eŭropa Unio (EU). La komisiono, foje nomata registaro de EU, konsistas el 28 membroj – po unu el ĉiu lando de EU. Litovion en ĝi reprezentas Vytenis Povilas Andriukaitis, komisionano pri sanprotektado kaj pri sekureco de manĝaĵoj, kiu scias kaj subtenas Esperanton.

Li aktive partoprenis en kontraŭsovetia movado por la sendependiĝo de Litovio ankoraŭ dum la Sovetia periodo. Ekde 1990 ĝis 2012 li estis parlamentano (krom la periodo 2004–2008). Dum 2000–2004 li estis vicprezidanto de la parlamento. Kaj ekde 2012 ĝis 2014 li estis ministro pri sanprotektado de Litovio. Li estas vicprezidanto de Litovia Socialdemokrata Partio.

Pro sia politika agado Andriukaitis iom deflankiĝis de Esperanto, tamen neniam ĝin forgesis kaj, laŭ siaj ebloj, helpis al Litova Esperanto-Asocio. Dum lia laboro en la parlamento kelkfoje vizitis lin litovaj kaj alilandaj esperantistoj, ĉefe pro la organizado de la 90a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Vilno en 2005.

La Eŭropan komisionon oni ne konfuzu kun la Konsilio de Eŭropo, kiu estas interregistara organizo kaj ampleksas multajn landojn ekster EU, ekzemple Rusion. Sed ankaŭ tie influas esperantistoj: Veronika Poór el TEJO estis elektita en la Konsila Konsilio pri Junularo de la Konsilio de Eŭropo. Tiu ĉi sukceso fontas el plurjara profesia agado de TEJO en eksteraj rilatoj (KER).



La KER-grupo havas ĉirkaŭ kvardekon da junuloj tutmonde agantaj en eksteraj rilatoj. La rimedoj estas tre malmultaj, kaj pro tio TEJO tre

bonvenigas subtenon por daŭrigi sian agadon. Ekzemple frue en majo okazos kunsido de la ĉefa plenumorgano de IKRJO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj), kaj ĝi mem devas kovri tiajn kostojn el la ordinara buĝeto...

Se vi volas finance subteni la agadon de TEJO pri eksteraj rilatoj, bv. konsideri donaci tra UEA kun priskribo: “TEJO-KER”. Pagmanieroj estas priskribitaj ĉe http://uea.org/alighoj/pag_manieroj.html.

[El La Ondo de Esperanto n-ro 5 kaj uea-membroj]

Esperanto en usona artomuzeo

Komence de la jaro, la Francesco Maurelli kaj Sara Spanò vojaĝis al Novjorko interalie por reprezenti TEJO en la Junulara Forumo de la Ekonomia-Sociala Konsilio de UN kaj en Komuna Cerboŝtormo de IKRJO pri la novaj daŭripovaj evoluigaj celoj. Estis tre bone por TEJO esti reprezentita en tiaj eventoj, kaj retumi kun la aliaj organizoj en IKRJO kaj FoJE (Forumo Junulara Europa).

Antaŭ ol refluigi European, ili sukcesis viziti la faman muzeon Guggenheim. Tie ĝis la 3a de majo estas ekspozicio pri la artlaboroj de On Kawara, japana “koncepta” artisto. Unu el liaj pentraĵkategorioj estas “Datoj”, do li pentris la daton kiam li estis pentranta. Por la monato, li uzis la unuajn literojn de la monato, en la lingvo uzata en la loko kie li estis tiam (angla se en Usono au Britio, franca se en Francio, ktp.). Tamen, kiam li estis en lokoj kun ne-latina alfabeto, li uzis Esperanton.

JAN. 4. 1966	NOV. 2. 1967	5 ABR. 68	MAY 31. 1970
24. MARZ 1976	MAR. 10. 1978	DEC. 21. 1980	NOV. 16. 1982
SEPT. 30. 1988	27 OTT. 1990	4 AŬG. 1993	26. ĀG. 1995

La klarigo pri lia uzo de Esperanto estas plurfoje legebla en la retejo de la muzeo kaj eĉ sur la muro de la ekspozicio. Ĉi-supre vi vidas ekzemplojn de lia laboro – notu la hoketon super Ŭ ĉe la 4-a de aŭgusto!

Alia artaĵkategorio de On Kawara ankau rilatas al la serĉo de internacia komunikilo. Kiam lia mentoro petis lin aranĝi poemon kiu estu komprenebla ĉie ajn en la mondo, naskiĝis la serio “Mi renkontis” kun listo de nomoj de homoj renkontitaj, ĉiun tagon en malsama folio.

Francesco Maurelli



Esperanto estis reprezentita ankaŭ en la Odense-a foiro de "Krop-Sind-Ånd". Jen deĵoras en la budo Lise-Lotte, Arne Casper kaj Tara.



El Nepalo estas ankaŭ ĝojiga novaĵo. Jen Alinka Chhetri (antaŭe Pokharel, ŝi intertempe edziniĝis) tenas ĵus ricevitan Esperanta-Danan vortaron. Tiun ŝi siatempe entajpis komputile kaj Peter Wraae kunportis al ŝi ekzempleron de la fina rezulto.